

# Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

## TIEL OKAZIS

### EN TOKIO – LA 100-A JAPANA ESPERANTO-KONGRESO

\*de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro, en la Halo Funabori-Turo en Tokio

La Kongreso mem altiris 719 aliĝintojn, inkluzive de 48 el aliaj landoj. Nia rondo havis standon, por ekspozicii kaj vendi niarondajn produktojn. En la Amika Vespere de la kongreso, la korusa grupo kantis kelkajn esperantajn kantojn, kaj ges-roj lwaya ludis melodiojn per mandolino kaj klavaro.

### EKSPOZICIO EN LA INTERNACIA FESTO DE JOKOHAMO

\*la 19-a kaj 20-a de oktobro, en la parko "Zoo-no-hana" en Jokohamo

En ĝi ni ekspoziciis pri Esperanto. En la 19-a, taĝika esperantisto, s-ino Mehrangez vizitis la ejon, kaj demonstris internaciecon. Ŝi poste vizitis lernokunsidojn regulajn, kaj havis tempon por interparoli kun la klasanoj tie lernantaj.

En la 20-a, bedaŭrinde pro pluvego, la okazaĵo daŭris nur ĝis tagmezo.



## NIAJ PLANOJ

### ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

\*Regula Klaso en merkredo por legado de "Punkuino".

### RUDIMENTA KURSO DE OKTOBRO

\*De la 31-a de oktobro, ĝis la 30-a de januaro, ĵaŭde, 20:00-21:30, en unu el la ĉambroj

Ĉi-foje ni havas kurson en vesperaj horoj.

### ZAMENHOFA FESTO EN KAWASAKI

\*la 15-a de decembro posttagmeze, en la Internacia Centro de Kawasaki

La 4 rondoj en la gubernio Kanagawa, nome tiuj en Kawasaki, Yokohama, Huzisawa kaj Odawara havos komunan festotagon unu fojon jare. Ĉi-jare, inter alie, s-ro Kitagawa Hisasi, kiu tradukis poemojn de fama japana poeto Tanikawa Syuntaro, rivelos la sekretojn de la tradukado, kaj gvidos tradukadan ekzercon.

### JARFINA FESTENO DE LA RONDO

\*la 21-a de decembro vespere, en la ĉina restoracio Fukuyoken, same kiel en la lasta jaro.

### LA JARKUNVENO DE JOKOHAMA ESPERANTO-RONDO

\*la 26-a de januaro en Tikyuu-simin-plaza

Ĝi estos la plej supera decid-organo de nia rondo, en kiu ni resumos la jaran buĝeton kaj la raporton, kaj fiksos tiujn por 2014.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

---



---

## 92a Legokunsido

---



---



En la 14a de septembro okazis legokunsido, kun 6 venintoj. La titolo de la legita libro estas

“Sur Sanga Tero” de Julio Baghy

### Sur Sanga Tero

Mizro Iwaya

Tiu ĉi romano estas fakte postkuranta verko de “Viktimoj” kiun ni legis en nia legokunsido, en marto ĉi-jare. La ĉefheroo Johano transmigris al orienta kaptitejo Nikolsk-Ussurijsk “por forgesi la doloron” kiun li suferis en la antaŭa Berezovka. Kiam mi komencis legi ĝin, mi rimarkis ke la unua ĉapitro atentinde brilas sugestante denunan tragedion per kruela konduto de ŝakalo Smirnov. Tia komenco pruvas ke la verko estis bone aranĝita kaj bone kovata dum longa tempo. Fakte pasis ok jaroj de post la antaŭa verko.

Ankaŭ ĉi tie Johano kaj aliaj kaptitoj suferis multon. Kalmukov kaj Smirnov estas ĉefaj antagonistoj en la romano. Sed ĝenerale dirite aperis ne tiom da tragedio kiel mi antaŭsupozis. Precipe la konduto de leŭtenanto Striĉkov multe mildigis la suferon de la kaptitoj. Mi ne scias ĉu tio estas fakto aŭ fikcio, sed lia ekesto multe malseverigis la atmosferon de la romano.

Ĉifoje la heroino estas nomata Poliena. Ŝi devenis de pola familio kaj, kiel kutime, perdis sian familion dum la milito. Johano kaj Poliena ofte interparolis en la romano kaj tiamaniere klariĝas iliaj opinioj kaj kredoj al legantoj. Kiel supozite, ili amas unu la alian kaj tamen disiĝas ĉe la fino. Tia strukturo rememorigas al mi la strukturon de fama serio de japana kinofilmulo “Torasan”. Ankaŭ ĝi havis ĉiam renkontiĝon kun heroino kaj disiĝon ĉe la fino tra la tuta serio.

Nu surprize al mi ke mi trovis ĝian precedencon en “Literatura Mondo”, ses fojojn de Junio ĝis Decembro 1923. Ĝi estas “Modernaj Robinzonoj” de Teodoro Schwartz. En ĝi la ĉefheroo, la verkinto mem, kun dekelkaj kolegoj forkuris el japana(!) kaptitejo kaj migris okcidenten al Eŭropo trans amasaj obstakloj. Kompreneble Baghy, kunredaktanto de LM,

legis ĝin kaj kredeble ricevis gravan inspiron. Ja multaj hungaroj havis similan sperton, ĉar Hungario estis parto de Aŭstria Imperio kiu malvenkis en la unua mondomilito!

### Denova renkontiĝo kun la romano “Sur sanga tero”

Aida Yayoi

Estis ĝojege, ke mi renkontis denove en la 92a legokunsido de Hamarondo la karan romanon “Sur sanga tero”. Jam dek kelkaj jaroj pasis post kiam mi renkontis ĉi tiun romanon kaj stimulate de pasio tradukis ĝin japanen. En la lastaj jaroj mi tamen preskaŭ ne relegis la originalon kaj pro tio mi maltrankviliĝis pensante ke iu fremda vizaĝo atendas min por seniluziigi iaman adoron al la romano. Feliĉe tia timo ne estis necesa. La romano senŝanĝe restis fascina, pura kaj poezia. Impresis min ne nur propraj epizodoj en la unua parto sed ankaŭ lerte manipulita disvolviĝo en la lasta duono, kiu pli kaj pli kohere koncentriĝis ĝis la trista finiĝo. Mi estis profunde emociita ankaŭ ĉifoje. Kun amo refreŝigita al la romano, mi konfirmis grandan kapablecon de la aŭtoro Julio Baghy.

En la romano pli ol dek personoj ludas impresajn rolojn. Baghy priskribis iliajn karakterizaĵojn vive, humure, simpatie, nuanco-plene. El diversaj vidpunktoj la aŭtoro rakontis pri allogaj scenoj. La protagonisto kaj ĉiuj aliaj senescepte multe suferis sur sanga tero de Siberio. Ili tamen dignoplene alfrontis la suferojn. Tiuj epizodoj estas kortuŝaj, kaj kiam ili kunkudrite teksas tiel nomatan unu grandan mozaikbildon, tie reliefigas mizeraj sed kuraĝigaj homoj, kiuj travivis malfacilaĵon en la jaroj post la unua mondmilito.

Pro tiu mozaika stilo ĉi tiu romano facile legeblas. Oni povas ĝui apartan parton laŭ sia plaĉo. Aliflanke estas malfacile tuj kapti intrigon de la tuta teksto. Oni devas legi kelkajn

ĉapitrojn antaŭ ol vidi ĝeneralan konturon kun temo. Kiam mi sendis mian tradukaĵon al miaj konatoj, kelkaj el ili esprimis iom da malkontento pri kerna mesaĝo. Estas dubinde, ĉu la aŭtoro detale kalkulis kiel konstrui la romanon ekde la komenco, ĉar ŝajnis al mi, ke iu epizodo estas tro simple kaj mallonge skribita por altigi efikecon. Ĉu la aŭtoro celis diversajn scenojn amuzi legantojn pli ol koncentri ilian atenton al impona, ideo-orientita literaturo?

Dank' al s-ro Baghy mi povis konatiĝi kun allogaj figuroj kiel Bardy, Striĉkov, Podenko, Poliena, Fiza, Mihok, Izor, Lio Fu Peng, Lusja, Ĉurin, ktp. Ili vere estas amindaj, sinceraj, humanaj. Kial ili povis teni tian belan kvaliton kiel homo en la infero de milito? Kial ili povis elteni malesperon kaj kruelecon? En la kaptitejo floris serioze eĉ filozofaj interparoloj inter iamaj kontraŭuloj, kaj krome naskiĝis amo transnacie inter homoj revo-perdintaj kaj revo-serĉantaj. Ĉi tiu romano estis longe favorata mondscale de multaj amantoj de literaturo, kaj la kialo, laŭ mi, probable estas en la omaĝo al homoj, la omaĝo ŝajne febla sed neŝancelige kantata sur la bazo de la romano. La simpatio al la romano venas de tie, mi pensas.

## Tamen resti homecaj SUR SANGA TERO

Tanigawa Hiroshi

En la romano "SUR SANGA TERO" de Julio Baghy ni legas terurajn kruelaĵojn kaj aliflanke kortuŝajn humanecaĵojn okazintajn sur la tero de Siberio kie furiozis, tuj post la Rusa Revolucio, ĥaosaj perturboj.

Sangavida Vladimir Smirnov, la kapitano de Rajdĉasistoj de la blanka reĝimo, mortigis multajn homojn per elektitaj torturoj.

Nikolaj Karesev, kozaka serĝento, senkompatate entuziasmis nur por akiri laŭdon de Smirnov.

La despotisma reĝimo de Caro estis faligita de la Ruĝa Revolucio. Kaj sekvis t.n. civilaj militoj inter la revolucia tendaro kaj la blanka reĝimo intencanta la relevigon de la carismo. La eksterlandaj milittrupoj inkluzive de la japana intervenis la militon. Kaj tiu interveno el eksterlanda armeo pliiĝis la sangajn tumultojn. Perfortoj revokis kontraŭperfortojn. Sangofluoj

estis repagitaj de kontraŭsangofluoj. Siberio fariĝis tragika Sanga Tero.

Sed ni vidas en ĉi tiu romano diverstipajn homojn, persiste vivantajn tamen homece sur tiu Sanga Tero.

Leŭtenanto Striĉkov, la efektiva estro de la civila militkaptitejo, surprize plibonigis la vivkondiĉon de la kaptitoj. Li sincere kompatis la kaptitojn agoniantajn pro malsato, kruelaj perfortoj kaj ĉiaj kontraŭhomecaj traktoj. Sentema ulo, li faris ĉion eblan por plibonigi la cirkonstancojn de la kaptitoj. La skrupula Podenko, lia superulo, timis, ke la stabo de la blanka reĝimo povus severe riproĉi Striĉkovon pro lia troa bonkoro al la kaptitoj.

Striĉkov diris;

"La homa boneco estas ja ofte dormema, sed sufiĉas nur vekoj por stimuli ĝin al viglado." "La homoj komencas reakiri sian animan ekvilibron. Kaj tiel estis ĉiam en la historio."

Kun la firma optimismo de Striĉkov pri "la homa boneco" mi samkonstatas.

Ankaŭ la kondutoj kaj la vortoj de Johano Bardy, hungaro, la heroo de ĉi tiu romano forte impresis min.

Johano kuraĝige alparolas al Poliena Aleksandrovna, kiu, perdinte sian edzon kaj filon, sinkas en la profundo de malespero;

"Mi tiel dezirus, se via fido al la Vivo revenus iun tagon."

"Mi neniam estis revoluciulo. Mi abomenas la perforton, kiu katenas la liberecon de la animoj. Mi estas revteksanta homo. Se la sonĝoj evitas min, mi sentas min mortinta. Ankaŭ tiaj homoj devas ja ekzisti."

Poliena respondas al Johano;

"La vivo estas nur prozo. Sed mi ne timas, ke vi iam ajn rekonscios pri tio, ĉar en ĉiu prozo via animo admiras la poezion de la Vivo. Bone estas tiel, Johano!"

Mi trovas Johanon, ne kiel nur simplan revoteksanton, sed kiel aktualan batalanton kontraŭ la malhumanecaj kruelaĵoj.

Leginte ĉi-romanon mi pensis pri la japana diplomato Sugihara Ĉiune (杉原千畝). Estante ĉefkonsulo ĉe Litovio en 1940 li donis al la judaj rifuĝintoj japanion-transpaskan vizon. Japana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj plurfoje sendis instrukcion ke li ne donu vizon al la judoj. Post grandega ĉagreniĝo li fine

decidis kontraŭi la instrukcion de la Ministerio. “Savi la vivojn superas la portempan politikon”, jen estis lia fina vivkoncepto. Estas dirite, ke la “Sugihara-Vizoj” savis ĉirkaŭ 6 mil judajn vivojn.

Rilate tion ni ne devas forgesi la nomojn ankaŭ de Nei Saburoo (根井三郎), ĝenerala konsulo ĉe Vladiostoko, kaj Kocuĵi Secuzoo (小辻節三), studanto de la juda kulturo (en Japanio). Riskante eĉ sian vivon, ili helpis la

judojn kunportantajn la “Sugihara-vizon”. Sen iliaj sindonemaj kontribuoj la “Sugihara-Vizoj” restus fine senvalidaj.

Julio Bagy emociplene bildigis la figurojn de la homoj, kiuj faras la teron sanga, kaj aliflanke aliajn homojn, kiuj tamen restas persiste humanecaj sur Sanga Tero. Baghy deziris aserti, ke la fundamenta naturo de la homoj estas esence humaneca, mi pensis.



## Voĉo de legantoj

Pri la septembra n-ro



*Karaj, dankon por Via gazeto Novajoj Tamtamas, tre plaĉis al ni la rakonto "Luno kaj foko". Fartu plu sukcese!*  
*En la nomo de AEH, Jarmila Rýznarová*

Pri la oktobra n-ro



*Kara amiko Mizro, dankon por Via bulteno Novajoj Tamtamas. Tuj mi tralegis ĝin. La koloraj fotoj estas belegaj. Bedaŭrinde, ke nia gazeto Informilo ne povas havi kolorajn fotojn, nur por tiuj, kiuj ricevas ĝin elektronike. Sed ni dissendas ĝin al preskaŭ 170 esperantistoj en papera formo.*

*Tie, kie ges-roj Doi skribas pri Bulgario, mi partoprenis en 1978 UK en Varna kaj mi memoras, ke mi fotografis etan knabineon ĉe la violin-prezentado. Estas interese, kiam mi legis pri tio de la aŭtoroj.*

*Mi jam finpretigas nian gazeton Informilon, do eble ankoraŭ unu semajnon, ol Vi ricevos ĝin. Fartu bone.*  
*Jarmila Rýznarová el la ĉeĥa urbo Pardubice.*



*Dankon! La nova eldono kun koloraj bildoj estas belega.*  
*E. James Lieberman*

## el Pola RetRadio



*Pola RetRadio prezentis, en la elsendo je la 22a de oktobro, pri la oktobra n-ro de "Novajoj Tamtamas" per la voĉo de Barbara Pietrzak. Ŝi menciis pri ĉiuj artikoloj en tiu speciale kolorplena numero, kaj inter alie aldonis personan epizodon, ke ŝi, same kiel Koyama Takeŝi, portis multe da vintraj vestoj al Islanda UK, kiujn ŝi fakte ne bezonis.*